


# Eŭropa Bulteno

Februaro 2008, № 2 (67)

## De la redakcio...

*Karaj legantoj,*

*Okazis ke lastaj kelkaj numeroj de Eŭropa Bulteno ne estis tute legeblaj por ĉiuj, ĉu pro neinstalita taŭga programaro, ĉu pro apartaj operaciaj sistemoj aŭ pro iu alia kialo. Por faciligi legadon de la Bulteno, mi malfermis paĝon "Eŭropa Bulteno" en Ipernity (jen ligilo <http://www.ipernity.com/doc/41818>), de kie vi povas preni la Bultenon kaj legi ĝin. Tie troveblas ankaŭ malnovaj numeroj, ekde kiam la Bulteno komencis aperi en elektrona formato. Formato ofertita en Ipernity paĝo estas ".pdf". Se ankaŭ tio ne helpas, ni provos trovi pli taŭgan solvon. Ĉiu el vi, laŭ deziro, povus ricevi la Bultenon al sia retpoŝta adreso, nur vi devas kontakti min.*



*Agrablan legadon,  
Vesna Obradović*

## 27 SVISAJ PARLAMENTANOJ SUBSKRIBIS LEĜPROPONON FAVORE AL ESPERANTO

La politike altnivela apogo al Esperanto: la Nobelpremia kandidatigo de UEA fare de svisaj parlamentanoj (novembro 2007) havas tre pozitivajn sekvojn en Svislando. Aperis politikistoj kiuj deziris fari ion por Esperanto. Rezulte de la pretiga kunlaboro inter SES (ĉefe Mireille Grosjean) kaj la iniciatintoj, Esperanto povus ricevi plian subtenon, agnoskon je ŝtata nivelo.

Antaŭ kvin tagoj, la 21-an de februaro 2008, leĝpropono estis submetita en la kantono (ŝtato) de Neushatelo kun subskribo de 27 parlamentanoj el diversaj partioj. La leĝpropono listigas interalie tiujn punktojn: ŝtatnivele informadi pri esperanto, utiligi ĝin en diversaj oficialaj dokumentoj (tradukoj), en turismo loka (prospektoj), ebligi kaj subteni la instruadon de la lingvo laŭ nedevisa formo. Gazetara konferenco okazos en CDELI la 4-an de marto 2008 kun kelkaj el la 27 deputitoj, kun la ĉeesto de Mireille Grosjean, kunprezidantino, kaj Stefano Keller, sekretario de SES.

Detala raporto kaj traduko de tekstoj aperos post la konferenco.

Mi invitas laŭeble multajn kiuj konas la anglan, dediĉi sin iom al la blogo de eŭropa komisionano pri sciencoj Janez Potočnik <http://blogs.ec.europa.eu/potocnik/>

Li ne verkas multon (1-2 foje monate) kaj tre malmultaj rimarkas tion kaj reagis. Li mem havas pozitivan opinion pri Esperanto, do ne necesas konvinki lin pri tio, sed se oni fojfoje reagus al iuj el liaj skribaĵoj laŭ nia esperantista maniero (en du lingvoj: en la propra nacia kaj Esperanto) li rimarkus multe pli nian ekziston kaj subtenus nin kiam por tio venos momento.

**Zlatko Tišljar**

## UNUA MINISTRA KONFERENCO PRI MULTLINGVISMO, BRUSELO, LA 15-AN DE FEBRUARO 2008 RESUMA RAPORTO

1. La konferencon kunorganizis la slovena prezidanteco kaj la Komisiono.
2. Ĉeestis reprezentantoj de ĉiuj EU-landoj kaj de Norvegio. Inter ili estis registaraj ministroj de la sekvaj landoj: Aŭstrio, Germanio, Grekio, Hungario, Irlando, Latvio, Litovio, Luksemburgio, Pollando, Rumanio kaj Slovenio.
3. Komisionano Orban substrekis ke la manko de fremdlingvaj konoj estas la "ĉefa malhelpo al kariero eksterlande", kaj rekomendis la lingvolernadon dum la tuta vivo. "Kion ni faru ke lingvoj estu pontoj?", li demandis, proponante ke la EU-landoj agnosku la valoron de enmigrintoj kiel helpo al modernigo, kaj ke ili ne konsideru diversecon kiel minacon.
4. Venis interesa ideo dum la konferenco de la prezidantino de la Komitato pri Kulturo kaj Edukado de la Europa Parlamento, grekino Katerina Batzeli, kiu proponis ke la interkultura dialogo devus esti konstanta, kaj ne nur dum 2008. Tiu ideo estas nepre subteninda.
5. La Raporto Maalouf: Kvankam multaj ministroj uzis la okazan por iom detale priskribi la lingvolernadon en la propraj naciaj sistemoj de edukado, la ĉefa diskutato estis sendube la Raporto Maalouf, kies ĉefa ideo estas la koncepto de "persona adoptita lingvo", kiun oni angle nomas PAL (=amiko, ĉikontekste lingvoamiko): por defendi la multlingvismon, ĉiu civitano lernu ankaŭ alian lingvon pro persona intereso. Tiu lingvo ne estu la angla, la elekto estu kiom eble plej granda, kaj la civitano lernu ĝin ĝis la nivelo de dua denaska lingvo. La granda plejmulto subtenis la ideon, kaj trovis ĝin inda je plua esploro, kaj konsentis kun la politiko de la Komisiono ke "ne sufiĉas la angla". Nur la angla kaj nederlanda reprezentantoj ne volis subteni la ideon, kaj diris ke "oni ne diru al homoj kiujn lingvojn ili lernu". S-ro Maalouf revenis por klarigi ke li tute ne skribis pri devigo lerni iun lingvon, sed nur celis pligrandigi la elekton, kaj ke ne estu "nur la angla" konsiderata.
6. Estas interesa hispanlingva kontribuo ĉe <http://www.delbarrio.eu/2008/02/un-informe-de-intelectuales.html>, kiu atentigas pri la potencialo de la Raporto Maalouf por Esperanto. La Raporto estis jam severe kritikata fare de esperantistoj, foje tute prave. Sed ni ne forĵetu la bebon kun la malpura akvo: eble ekzistas elementoj en tiu raporto, kiuj povus servi al Esperanto. Ekzemple, la ideo ke civitano devus majstri alian lingvon, la "personan adoptitan lingvon" ĝis la nivelo de dua denaska lingvo. Fakte maloftas homoj kiuj estras iun ajn duan lingvon tiagrade, sed inter ili estas pli ol unu esperantisto. Pro la reguleco de Esperanto, homoj kiuj regule uzas ĝin fakte atingas pli profundan gradon de majstreco ol en alia nacia lingvo. Tute logike, ju pli da neregulaĵoj ekzistas en iu lingvo, des pli da tempo iu lernanto bezonas por estri ĝin.
7. Fine, pri la kontribuo de Komisionano Orban al la forumo pri plurlingveco <http://forums.ec.europa.eu/multilingualism/?p=12&cp=5#comments> la 6-an de februaro 2008. Kompreneble Esperantistoj ne konsentas pri lia ankoraŭ mankohava kompreno de Esperanto, sed ni ne forgesu la realan progreson ekde la "nigra epoko" de Figel. Orban nun klare skribis:

***"Sendube kelkaj esperantistoj kiuj ĉe-estas ĉi-tiun forumon ne konsentas kun mi, sed mi kredas ke ni bezonas interŝanĝi niajn vidpunktojn (mi trovis kelkajn el viaj argumentoj tre interesaj, kvankam mi ne konsentis kun pluraj el ili)".***

Tio malfermas pardonon por ni. Ni uzu ĝin. Sed ni estu moderaj, ne atakemaj, kaj ni bone pripensu tion, kion ni intencas skribi. Kaj ni ofte substreku la potencialan kontribuon de Esperanto al la plibonigado de lingvolernado, por resti en la akceptata kadro de multlingvismo. Ni celu pozitivan mencion de tiu eco de Esperanto en la strategio pri multlingvismo kiun la Komisiono intencas publikigi septembre 2008.

**Seán Ó Riain**

## ASEMBLEO DE AŬSTRIA ESPERANTO-FEDARACIO

Nun pli ligite al la estanteco mi komunikas al vi ke AEF (Aŭstria Esperanto-Federacio) okaze de sia ĝenerala asembleo organizos inter la 11-a kaj 13a de julio Esperanto-renkontiĝon en la tirola urbo Wörgl, ĝuste antaŭ la UK. Tie staras Zamenhofa monumento kaj tie regas urbestro kiu sub la titolo esperantlingva "VIVOMONDO" organizas kulture vivon de sia urbo, tamen ne estante esperantisto. Nia estrarano Christian Eppler la 28-an de februaro veturis tien por havi laborkunvenon kun la urbestro cele al fina strukturigo de la evento kiu okazos kadre de urba festo je la 12a de julio.

**Hans Michael Maitzen – prezidanto de AEF**

## KUNVENO SE SLOVENAJ NEREGISTARAJ ORGANIZOJ

**Raporto pri ĉeesto en kunveno de slovenaj neregistaraj organizoj kiuj aktivas por EU dum la slovena prezidado kun subtemo »Interkultura dialogo« okazinta en Ljubljana, la 12-an de februaro 2008.**



La kunvenon kunvokis CNVOS (organizo por neregistaraj organizoj). Enkonduke parolis reprezentantoj de slovena buroo de la Eŭropa Parlamento (Maja Kezunovič-Krašek), slovena buroo de Eŭropa Komiisono (Mihela Zupančič), de Ministerio por kulturo (Sonja Kralj Bervar) kaj de Buroo por informado de la Registaro (Anže Logar). Poste oni prezentis planojn kaj kelkajn konkretajn projektojn en la jaro de interkultura dialogo. Mi eksciis ankaŭ ke en

Oslo oni planas en junio konferencon pri lingvaj demandoj. Ni devus informiĝi pli detale por ke iu reprezentu nin tie.

Mi prezentis mallonge EEU- konferencon Interkultura Dialogo kaj komunikado kaj ke EEU eldonas apartan informilon pri slovena prezidado en Esperanto kaj pluraj malgrandaj lingvoj. Mi konkludis ke ofte malgrandaj landoj inter kiuj Slovenio tro atentis grandajn lingvojn (oficiale oni uzas krom la slovena nur la anglan kaj la francan) kaj ne la malgrandajn kaj pro tio ili ne miru ke ankaŭ aliaj ne atentis pri ili. Nun la slovena lingvo estas grava, sed post 5 monatoj ĝi denove estos sensignifa. Se ili atentus pli pri malgrandaj lingvoj, ankaŭ aliaj atentus estonte pri ili.

Mi distribuis materialojn kun la deklaro de la konferenco kaj mia libro en la slovena »Eŭropo, vi baldaŭ mortos«.

Reprezentantino de Eŭropa Parlamento informis ke ili povas disponigi al Neregistaraj organizoj sian salononon por kunsidoj kaj aranĝoj senpage. Mi ne tuj pensis, sed nun mi havas ideon proponi tie okazigi ekspozicion pri Esperanto.

Tiuj kunvenoj okazos ĉiumonate pri diversaj temoj. Mi partoprenos en kelkaj pliaj kies temoj proksimas al niaj E-intereso. 17.marto (eksterlandaj rilatoj – kun aparta atento al Okcidenta Balkano), 21. 04 (Schengen-limoj, migrantoj). 15. majo (Budĝeto de EU).

**Zlatko Tišljar**

## **EKSPOZICIO "JUNULARO EN INTERKULTURA DIALOGO: KION POVAS KONTRIBUI ESPERANTO?" EŬROPA PARLAMENTO, 30-31 JANUARO 2008**

En la Eŭropa Parlamento en Bruselo la 30-an kaj 31-an de januaro okazis ekspozicio pri la temo "Junularo en Interkultura Dialogo: kion povas kontribui Esperanto?" La ekspozicio povis okazi pro subteno de Ljudmila Novak, slovena ano de Eŭropa Parlamento kiu, kun Margareta Handzlik el Pollando, estas la dua membro de Eŭropa Parlamento kiu malferme esprimis politikan subtenon por rolo por Esperanto en la antaŭenigo de plurlingveco en Eŭropo. Ŝi mem lernis Esperanton en sia junaĝo, kaj, kvankam ŝi ne plu flue parolas ĝin, prelegis Esperante dum la 7a EEU-Kongreso en Maribor, Slovenio, aŭguste 2007. Ankaŭ ĉeestis konataj Esperantistoj kiel Angelos Tsirimokos, de la tradukservo de la Konsilio, kaj Guidi Ricci, de la jura servo de la Eŭropa Parlamento. La ekspozicion praktike organizis kaj financis Eŭropa Esperanto-Unio, kaj pli konkrete ĝia prezidanto Sean Ó Riain kaj Maja Tišljar, filino de Zlatko Tišljar. Ĝi estis kadre de pli granda ekspozicio pri "Junularo en Interkultura Dialogo", kiu bone kongruis kun la "Eŭropa Jaro pri Interkultura Dialogo 2008".

Estas ekspoziciataj afiŝoj belaj kaj trafaj pri Esperanto kaj ties kultura valoro, dezajnitaj de Danka Tišljar, fratino de Maja, kaj estas prezentata sur tablo kvardeko da libroj en kaj pri Esperanto, i.a. la nova lernolibro de Stano Marček en deksep lingvoj, la impone dika vortaro Germana-Esperanta de Krause, "Hungara Antologio", la Esperanta Meslibro de la Vatikano, la impona himnaro "Adoru", klasikaj tradukaĵoj de Goethe, Sartre, Shakespeare, la originala "Infana Raso" de Auld kun polaj kaj portugalaj tradukoj, la germana traduko de "La Danĝera Lingvo" de Lins, kiu altiris multan atenton, kaj materialo de konataj interlingvistoj kiel Blanke, Künzli, Tonkin, ktp. Aparte elstaris materialo pri la lernfaciligaj ecoj de Esperanto: pri la tre sukcesa brita projekto "Springboard"/Lingvolanĉilo, "Ludu kun Ni" kaj "Lingva Orientado per Esperanto" de Vilisics Formaggio, kaj pli teoriaj kaj sciencaj libroj de Frank kaj Lobin.

Mi prelegis mallonge pri Esperanto (komencinte per franca salutfrazo, mi poste diris germane kelkajn dankvortojn al Ljudmila Novak kaj laŭ la deziro de Ljudmila daŭrigis angle), rebatante interalie la argumenton pri artefariteco per komparo al "provtuba bebo", arte koncipita sed de tiam nature evoluanta al plene normala homo. Mi substrekis la kontribuon de Esperanto al interkultura dialogo kaj al la plibonigo de lingvolernado ĝenerale. Finis Flory Witdoeckt per tre bela kantado de la Eŭropa Himno en Esperanto, uzante la inspirajn vortojn de Umberto Broccatelli. Mi ankaŭ menciis ke la nova germana ambasadoro al NATO, Ulrich Brandenburg, estas denaskulo de Esperanto, la raporton Dell-Alba de 2004, kie 43% de EP-anoj volis almenaŭ esplori eblan rolon por Esperanto kadre de plurlingva Eŭropa Parlamento, kaj la esplorrezulto de la Raport Grin 2005, ke la 27 EU-landoj povus ŝpari €25 miliardoj se ili donus rolon al Esperanto. La alparolon mi komencis kaj finis per kelkaj vortoj en Esperanto, kaj dankis ankaŭ irlande, por substreki nian subtenon de plurlingveco.

Poste mi ricevis gratulojn de la slovena ministro pri la medio, Janez Podobnik, kiu vizitis Bruselon kaj havis multajn demandojn pri Esperanto, kaj de direktoro en la Eŭropa Komisiono, alia sloveno, Filip Majcen. Ambaŭ petis la tekston de la alparolo. Jozef Reinart promesis sendi materialon pri la slovaka iniciato al li, kaj li montris grandan intereson.

Kadre de la ekspozicio la 31-an de januaro la slovaka vicambasadoro en Belgio, Jozef Reinart, kaj mi havis tre bonan renkontiĝon kun Profesoro Bronisław Geremek, Vicprezidanto de Eŭropa Parlamento, antaŭa pola ministro pri eksteraj aferoj, kiu ludis gravan rolon en la liberigo de Pollando en Solidareco kun Lech Wałęsa. Ni ricevis 30 minutoj en lia oficejo. Taktike kaj por vekti intereson, Jozef Reinart menciis la decidon de la franca prezidanteco (dua duono de 2008)



prezenti la retejon de la prezidanteco kvinlingve, sed ne pole, kaj priskribis la slovanan iniciaton kaj la respondoj de diversaj registaroj al ĝi. Ni akceptis la politikan realecon ke Esperanto nuntempe povas unue progresi nur kadre de la EU-politiko de subteno por multlingvismo, kaj substrekis la lernofaciligajn ecojn de Esperanto, aparte menciinte "Springboard".

Li opiniis ke tio estas "tre bona aliro, kaj fakte la sola kiu havas esperon esti aŭskultata en la nuna Eŭropa Parlamento. Plejmulte subtenus vian ideon de lingva egaleco, sed ne Esperanton. Ili ne prenas Esperanton serioze, ĉar ilia sciado pri ĝi estas tre malalta. Kiam mi mencias ke Esperanto havas valorajn librojn kaj estas multe uzata, ili nur ridas, ne kredas min, kaj diras ke Esperanto estas afero de 'kelkdeko de fanatikuloj kiuj tudas ĉiujn per freneza ideo'. Mi petis lian konsilon pri kion li farus, se li estus en nia loko. Li respondis ke unue ni devos certigi "ĉeeston" de Esperanto en la prilingva debato en la Parlamento, 'kiun ĝi ne havas nun'. Por fari tion, li resurektis la ideon de grupo de 5-6 EP-anoj, de ĉiuj grandaj politikaj grupoj, por antaŭenigi Esperanton por plibonigi la lingvolernadon ĝenerale, kaj tiel kontribui al multlingvismo. Nur en tiu senco estas iu ajn reala ebleco, li opiniis.

Pri neformala grupo de EP-anoj: Li kompreneble menciis Margareta Handzlik, Ljudmila Novak, Marco Pannella kaj Marco Cappato, kaj li diris ke li provos trovi verdan EP-anon kiu subtenus. Mi promesis paroli kun mia amiko, irlanda EP-ano kaj forta subtenanto de la irlanda lingvo, Seán Ó Neachtain, kiu apartenas al la plej granda politika partio en Irlando sed nur al eta grupo en la EP, "Eŭropo de la Nacioj". Ni iom cerbumis kiun inviti el la Socialistoj - Ljudmila Novak promesis paroli kunl sia belga-flandra kolego Ivo Belen. Ni parolis pri organizo de la debato post-aprile por vekti intereson - mi proponis temon kiel "Esperanto: amiko aŭ malamiko de multlingvismo", kaj Geremek pensis ke tio estus bona komenco.

Poste li venis kun ni rigardi la ekspozicion, kie ni denove renkontis Ljudmila Novak, kaj ili havis praktikan, konkretan konverscion pri tio kiel antaŭenigi Esperanton en la Parlamento. Mi poste skribis por danki Profesoron Geremek kaj Ljudmila Novak pro la grava subteno por nia lingvo kaj la lingva justeco.

Resume: sukcesa ekspozicio, kaj reala espereto de progreso en la Eŭropa Parlamento. Ni daŭrigu la laboron.

**Seán Ó Riain**

## **EKSPOZICIO PRI ESPERANTO**

*Okaze de la patrinlingva tago kaj Lingva Jaro en Maribor*

La 21-an de februaro en Popoluniversitato de Maribor (AZM-LU) estis malfermita ekspozicio pri Esperanto. Estis surtabule prezentitaj 8 afiŝoj kiujn EEU antaŭe ekspoziciis en Eŭropa Parlamento (sed en mapli granda versio) kaj surtable libroj, revuoj, turismaj prospektoj kaj artikoloj el Monato rilataj al SLOvenio. La ekspozicio daŭris 3 tagojn kaj la afiŝa parto la tutan semajnon. Plurcento da gelernantoj kaj diversaj partoprenantoj de kursoj, tribunoj kaj prelegoj rigardis la ekspozicion.

**Zlatko Tišljar**

## TOTALA MALSATO- KAJ SOIFOSTRIKO DE GIORGIO PAGANO POR KONVINKI LA MINISTRON FIORONI RICEVI LA PARTION DE LA RADIKALULOJ

**Deklaro de Giorgio Pagano, Sekretario de Esperanto Radikala Asocio**

"Ekde almenaŭ kelkaj dekoj da jaroj ni radikaluloj okupiĝas pri la temoj de la transnacia komunikado kaj de la demokratio kiu, en tiu kunteksto kaj precipe inter ĉiuj civitanoj de la Unio, devus validi por ne puni popolojn kaj sociajn klasojn: popolojn ne angleparolantaj kaj klasojn malplihavantajn.

Erara kaj ĉefe senkritika enpreno de la manieroj pere de kiuj ĝis nun estas plenumita la multlingva politiko de EU, akiris en Italio la rezultojn kiuj ankaŭ pasintsemajne, sur la kolumnoj de la ĵurnalo "La Repubblica", estas senkompute evidentigitaj en la artikolo "En la Italio de la magistrigintoj kiuj ne kapablas skribi".

Rilate al la grava renkontiĝo de la 15a de februaro en Bruselo inter la Ministroj pri Edukado de EU kun tagordo "Promocii la multlingvismon: komuna engaĝigo", la radikala Partio kiu ekde 1993 daŭrigas kampanjon por la lingva demokratio kune kun la radikala asocio "Esperanto" petis tre urĝan renkontiĝon al Ministro Fioroni.

Ankoraŭ ĉi matene, post retrofrapigo inter la Sekreterio de la Ministro kaj tiu de Vicministro Mariangele Bastico, Sergio Stanzani kaj Giorgio Pagano, subskribintoj de la peto, ne sukcesis ekscii ĉu estus disponeblaj "dek minutoj" por aŭskulti ilin koncerne la lingvan diskriminacion kiu, sub la nomo multlingvismo, estas realigita far de la Eŭrop-Unio malavantaĝe je ĉiuj neangleparolantaj popoloj. Kun la espero vidi akceptata (aŭ neakceptota) nian peton antaŭ la limdato mi decidis iniciati totalan malsato- kaj soifostrikon, kiun mi komencis la 11-an de februaro."

**Giorgio Pagano**

## BBC DU MATENOJN SINSEKVE PAROLAS PRI LA PREMIO NOBEL AL ESPERANTO



La 4-an kaj la 5-an de februaro, la Monda Servo de BBC parolis pri la propono de Esperanto, fakte UEA, al la norvega komitato pri la pac-premio Nobel.

La 4-an ili intervjuis unu el la du svisaj parlamentanoj, kiuj faris la proponon, kune kun aliaj 60 proponintoj, kaj la 5-an matene ili intervjuis la konatan anglan esperantiston kaj lingviston, John Wells, kiel antaŭan prezidanton de UEA.

John Wells respondis plurajn demandojn pri la nuna stato de Esperanto kaj tute aparte atentigis, ke nun komenciĝas periodo de falo de la angla pro ŝanĝigantaj mondaj forto-rilatoj kaj sekve en iu ajn momento la propono pri Esperanto povus tre forte aperi antaŭ la publika opinio.

**Renato Corsetti**

## ANTAŬKONGRESA AGADO



La buroo pri lernejoj de la provinco en Grosseto (Italio), dissendis al ĉiuj lernejoj troviĝantaj sur la teritorio pri kiu ĝi kompetentas, ĉirkulero ene de kiu estas indikitaj la vere elstaraj punktoj okazontaj laŭlonge de la Itala Esperanto Kongreso en la proksima aŭgusta monato kaj invitas ĉiujn gelnantojn partopreni E-okursojn kiu disvolviĝos ĉe lingva sekcio de la loka Instituto Antonio Rosmini.

Pri tiu neatendita paŝo (ĝenerale io eĉ simila ne okazas en similaj cirkonstancoj almenaŭ ĉe ni), ni dankŝuldas

la organizanton de la Kongreso mem, nia ne tro konata sed... ĝuste pro tio - des pli aktiva kaj dankinda, Piervittorio Orlandini.

**Enrico Brustolin**

## VORTOJ

Kio estas vorto? Jen, ĝi estas hazarda kunligo de sonoj, kiuj kreas en homa imago la bildon de iu aĵo aŭ iu ideo.

Ĉiutage ni estas ĉirkaŭitaj per la maro da vortoj. Ni ĉiutage aŭdas vortojn en la strato, en laborejo, en televido. Banalaj vortoj pri vetero, pri ĉiutagaj aferoj. Sed plimulto de tiuj vortoj estas indiferentaj, senvivaj kaj senpasiaj. Amaso de sekaj informoj, senkoloraj eldiroj, kiuj ne plenigas nian koron kaj menson. En la maro de vortoj ni ofte sentas solecon.

Sed estas ja vortoj kiuj tuŝas nian animon.

Jen, kiam ni aldonas nian koron, personan senton, al la vorto - tiam la vorto viviĝas. Tiam la vorto fariĝas viva, kaj ĝi vekas emocion, vivo-ĝojon kaj senton de feliĉo.

Homo serĉas kontakton, renkontiĝon kun alia homo – en reala mondo aŭ en virtuala mondo de interreto - ĉar li sopiras al vortoj plenaj de sento: plenaj de amo, plenaj de bonvolemo. Ni serĉas amikan interparolon, korespondon - ĉar ni sopiras al sentoplenaj vortoj, kiuj igas nin ridi, kunsenti, plori kune kun alia homo, nia amiko. Ni sopiras al vivantaj vortoj, kiuj riĉigas nian menson kaj animon.

Esperanto ne estas nur lingva fenomeno. Esperanto ebligas nin dissendi vortojn pri paco kaj amikeco al alia homo. Ĝi estas bonega ilo, kiu helpas al ni konstrui vojon al la koro de alia homo. Kaj jen estas klarigo de ĝia daŭrado.

**Jacek Lisowski**

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

Finredaktita: la 29-an de februaro 2008.

Redaktoro: Vesna Obradović

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Seán Ó Riain, Hans Michael Maitzen, Giorgio Pagano, Enrico Brustolin, Renato Corsetti, Jacek Lisowski kaj Vesna Obradović

Kontakto: [vesna.obradovic@gmail.com](mailto:vesna.obradovic@gmail.com)

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, [www.europo.eu](http://www.europo.eu)